# EKO 2025

**Naŭ novaj akademianoj**

EKO 2025-36, Septembro 7 Pezo: Word 40, PDF 500 KB, Sen alkroĉaĵo Sume 640 KB

## Naŭ novaj Akademianoj

La Akademio de Esperanto, nia plej grava lingva institucio, konsistas el 45 membroj. Ĉiun trian jaron okazas elekto de triono de la membroj por la 9-jara oficperiodo. Pro forpasoj kaj demisioj oni povis en februaro 2025 elekti 19 personojn (el 21 kandidatoj). Inter la elektitoj naŭ personoj estas novaj en la Akademio, temas pri: Eckhard Bick, Cho Sung Ho, Gong Xiaofeng (Arko), Abel Montagut, Jorge Rafael (Rafa) Nogueras, Jukka Pietiläinen, Maria Rosaria (Sara) Spanò, José Antonio Vergara kaj Birke Dockhorn. En la Akademio membras ĉi-momente du nederlandlingvanoj: Marc van Oostendorp (Nederlando) kaj Paul Peeraerts (Belgio). Gerrit Berveling ne rekandidatiĝis. Pli da informoj pri la taskoj kaj laboro de la Akademio de Esperanto vi povas trovi en ĝia retejo: https://www.akademio-de-esperanto.org

:La informo venas pere de numero 2025-3 de *La Fenisko*, la oficiala organo de la Nederlanda Landa Asocio

PS: La EKO-komunikoj kore gratulas la novajn akademianojn.

## Pri la Rezolucio de la Kongreso en Brno

Jen la plej freŝa artikolo aperinta en la retejo **uea.facila**, kiun prizorgas **Anna Löwenstein** kun siaj kunlaborantoj https://uea.facila.org/kunlaborantoj/):

Rezolucio de la 110-a Universala Kongreso de Esperanto en Burno

La artikolo prezentas la rezolucion de la ĵus okazinta Universala Kongreso en Burno (Ĉeĥio), kiu kunvenigis pli ol mil partoprenantojn. Ĝi temas pri la graveco de **Esperanto kaj novaj teknologioj kiel pontoj de paco kaj konfido inter popoloj**.

Normale kongresaj rezolucioj enhavas komplikan lingvaĵon, sed ĉi tiu versio estas speciale simpligita por ke ĉiu leganto povu facile kompreni la enhavon. Oni povasa nkaŭ **aŭskulti** la tekston, voĉlegitan de **Margaret Zaleski-Zamenhof**.

Mi varme rekomendas legi la artikolon, ĉar ĝi montras kiel Esperanto povas kontribui al pli justa, interkultura kaj paca mondo – tre aktuala temo por nia epoko.

Ahmad Mamduhi, prezidanto de ILEI

## Merkatiko en la mondo de Ondo

Dum kelkaj jaroj en la gazeto *La Ondo de Esperanto* estis publikigataj artikoloj de Dennis Keefe pri la temo “Esperanto kaj merkatiko”. Entute aperis 14 artikoloj. Ĉiuj artikoloj estas legeblaj en la novaĵretejo *La Ondo de Esperanto.*
Vidu la liston de la publikigitaj artikoloj ĉe https://sezonoj.ru/2025/08/keefe-12/

## Jen la enhavo de IPR 2025/3 (Jarkolekto 55)


- Enkonduko (Ahmad Reza MAMDUHI) p.3
- Raporto pri la ILEI-kongreso en Beogrado (Aranka LASLO) p.4
- Impresoj pri la ILEI-kongreso (RAVELOHARISON, ZERVAS, O. LOŽAJIĆ) p.8
- Simpozio de ILEI 2025 p.9
- Rezolucio de la 58-a Kongreso de ILEI p.16
- Raporto pri la 110-a UK en Brno (A. MADELLA, M. GROSJEAN) p.18
- Tago de Lernado (Marija BELOŠEVIĆ) p.21
- La Vojo de Renato (Mireille GROSJEAN, Ahmad MAMDUHI) p.23
- Françoise NOIREAU: AI en instruado (nova rubriko) p.26
- Gratulo al Mónika Molnár (Ahmad MAMDUHI) p.28
- El la landoj kaj sekcioj (AL, BE, CN, FR, RS, CH) p.29
- Gajnintoj de la konkurso Instruistoj de la jaro 2024 p.34


## Kursanoj en la Kongreso de ILEI



La 58-a Kongreso de ILEI okazis en Beogrado: Sur la foto aperas: kursanoj por komencantoj.j Raia Androvska gvidis ĝin. Jen ŝi kun la partoprenantoj .

La informoj el IPR 2025-3

## Novjara Renkontiĝo invitas vin

La 22-a Novjara Renkontiĝo (NR) kaj la 15-a Novjara Internacia Semajno (NIS, por junuloj kaj junaj plenkreskuloj) okazos de la 27-a de decembro 2025 ĝis la 3-a de januaro 2026, denove en Wiesbaden ĉe Rejno, 40 km okcidente de Frankfurto/Majno, en la junular-gastejo, en kiu ni jam plurfoje kaj tre agrable kunestis jarfine.

Informa paĝo http://esperanto.land/nr/#nr
Aliĝilo http://esperanto.land/nr/alighilo.shtml#alighilo
aŭ por NIS http://esperanto.land/nis/index.shtml#alighilo
Unuaj aliĝintoj http://esperanto.land/nr/partoprenantoj_nr22.php
kaj http://esperanto.land/nis/partoprenantoj_nis15.php
Ni atendas proksimume 150 ĝis 180 partoprenantojn el dekkvino da landoj.

Okazos prelegoj, diskutoj, laborgrupoj, lingvokursoj, manlaboro, sporto, koncertoj, ekskursoj kaj kafejo/drinkejo :) Certe ankaŭ ĉi-foje ni sukcesos kunmeti belan kaj varian programon, kiel pasintjare kaj dum la antaŭaj NR-oj. Fino de la nuna aliĝperiodo: lundo, 15-a de septembro 2025

## Pola retradio riĉe raportas

Antaŭ unu monato pli ol 1100 esperantistoj fizike ĝuis la etoson de la 110-a UK de Esperanto en Brno (Burno), Ĉeĥio. Multe pli da povis ĝui la UK-etoson kaj ekscii pri la kongreseventoj dank' al la tradiciaj prikongresaj sonraportoj de la Pola RetRadio en Esperanto (la iama Eo-Redakcio de Pola Radio) www.pola-retradio.org, aŭdiĝintaj ĉiutage en sep sinsekvaj elsendoj ekde la 26.07 ĝis 02.08.2025:

- https://pola-retradio.org/2025/07/e_elsendo-el-la-26-07-2025/
- https://pola-retradio.org/2025/07/e_elsendo-el-la-27-07-2025/
- https://pola-retradio.org/2025/07/e_elsendo-el-la-28-07-2025/
- https://pola-retradio.org/2025/07/e_elsendo-el-la-29-07-2025/
- https://pola-retradio.org/2025/07/e_elsendo-el-la-30-07-2025/
- https://pola-retradio.org/2025/08/e_elsendo-el-la-31-07-2025/
- https://pola-retradio.org/2025/08/e_elsendo-el-la-02-08-2025/

Jam en nia unua sonraporto, tuj post la sabata kunsido de la Komitato de UEA antaŭ nia mikrofono gastis la tiam ĵus elektita nova prezidanto de UEA, Fernando Maia Jr., skizante la plej gravajn taskojn, kiujn frontos la Asocio en la nova ofcperiodo. Tiu ĉi raporta elsendo kaj ĉiuj aliaj nun servas por la tradicia propono de nia Redakcio „Ni travivu la 110-an UK-on ankoraŭfoje".

Barbara Pietrzak

## Instruistoj de la Jaro – ILEI kaj TEJO kune

Paweł Fischer-Kotowski kaj Fransoazo Noireau iĝis la unuaj laŭreatoj de la konkurso *La Instruistoj de la Jaro*, organizita de ILEI kun subteno de TEJO. La gajnintoj estis anoncitaj en la 58-a kongreso de ILEI, kiu okazis fine de julio en Beogrado.
Legu pli ĉe https://sezonoj.ru/2025/08/ilei-39/

## Jen mesaĝoj kaj afiŝoj pri la Tago de Paco 2025

Tiu tago okazos en la 21-a de septembro. Preparu vin!

Esperanta mesaĝo

https://esperantoporun.org/wp-content/uploads/2025/08/Esperanto-Paca-Tago-2025.pdf

Esperanta Afiŝo
https://esperantoporun.org/wp-content/uploads/2025/08/Esperanto-Tago-de-Paco-2025-scaled.png

Angla mesaĝo
https://esperantoporun.org/wp-content/uploads/2025/08/Angla-Paca-Tago-2025.pdf

Angla afiŝo
https://esperantoporun.org/wp-content/uploads/2025/08/Angla-Tago-de-Paco-2025-scaled.png

Franca mesaĝo
https://esperantoporun.org/wp-content/uploads/2025/08/Franca-Paca-Tago-2025.pdf

Franca afiŝo
https://esperantoporun.org/wp-content/uploads/2025/08/Franca-Tago-de-Paco-2025-scaled.png

Rafael Lima

## La rondiranta rakonto kreskas

En aŭgusto aldoniĝis virinoj el Germanio kaj Rusio kaj reverkis partojn. Aliaj venas el Japanio kaj Italio. Nun havas ĝin itala virino.

Alessandra Madella, estrarano de ILEI.

## Hungara honorito



La Urba Konsilantaro de ;a hungara urbo Tata aljuĝis la arĝentan gradon de la Urba Premio Tata al Erzsébet Ködmönné Janka, kiu ricevis la premion ĉe urba ceremonio okazanta sur la loka Placo Kossuth, la 20-an de aŭgusto, 2025.

Erzsébet Ködmönné Janka ricevis la premion pro siaj agadoj en enkonduko kaj popularigo de la lingvo Esperanto, same kiel pro plibonigo de la bona reputacio de la urbo Tata kaj pro sia elstara rolo en la loka kultura kaj arta vivo.

https://esperantohea.hu/tata-varosaert-kituntetes-kodmonne-janka-erzsebet-2025-aug/

## Septembraj atingoj

Ĉi-septembre siajn naskiĝdatrevenojn festos **Stefan Maul** (85 jaroj) kaj **Leif Nordenstorm** (65 jaroj); krome ni rememoros la forpasintajn aktivulojn Hugo Röllinger, Aleksandras Dambrauskas, Löb “Leopold” Einstein, Andreas Gregorius Joannes, “Andreo” Cseh kaj aliajn meritplenajn esperantistojn.

Legu la liston de Esperantaj jubileoj kaj memordatoj por septembro 2025, kompilitan de Aleksander Korĵenkov, en la novaĵretejo *La Ondo de Esperanto* https://sezonoj.ru/2025/09/septembro-13/

========= vortoj: 1120 =========

Kunlaborantoj: Rob Moerbeek (NL), Elda Doerfler (IT), Frank Lappe (DE)

Jen la plej gravaj partneroj de la EKO-komunikoj

Universaleco, Instruistoj, Fervojistoj, Medicinistoj, Komercistoj, Blinduloj, Kolektantoj

La Komunikoj iras al la Landaj kaj Fakaj Asocioj, al la Komitato de UEA, pluraj instancoj de ILEI, al la Estraro de TEJO, al unuopuloj, kiuj petis la ricevon kaj la anoj de pluraj pasintaj AMO-seminarioj. Entute ĉ. 2800 ricevantoj

Ĉi tiu komuniko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde.

Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperintaj komunikoj legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe: https://www.ilei.info/agado/EKO.php

**Tridek numeroj de 2025 aperis, kune kun la kvardek kvar numeroj de 2024**

**ALDONU Aŭ SUBTRAHU VIN:** Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Por forigo, laŭeble informu min al kiu ekspedo-grupo vi apartenas. Mi povas forigi nur personojn kies retadresoj estas individue enskribitaj. Ne eblas forigi homojn, kiuj ricevas la komunikojn pere de retlisto.